

Rubèn Fernández Asensio

membro de

*Internacia Konsilio pri Arĥivoj / International Council of
Archives*

*Kataluna Arĥivista Asocio / Associació de Professionals de
l'Arxivística i la Gestió de Documents de Catalunya*

Kontraŭ terminologio

La “arĥivista Esperanto”, kiu neniam alvenis

Resumo: Por helpi esperantistojn kompreni la arĥivistajn terminojn, teorion kaj praktikon, kaj tiel pli bone akceptigi esperantajn arĥivojn, ĉi tiu artikolo revizias la terminaron proponitan de la Internacia Ĝenerala Priskriba Arĥivistika Normo (ISAD(G)) kontraŭ la diversecon de ĝenerallingvaj konceptoj en angla, franca, hispana, germana kaj kataluna, kun aparta atento al la historio kaj evoluo de la vorto kaj koncepto ‘arĥivo’ en diversaj lingvoj; ankaŭ la apliko de arĥivaj terminoj al informadiko estas diskutata. La komparo konkludas, ke kvankam arĥivistiko kiel fako ne bone solvis la diferencojn inter diversaj arĥivistaj tradicioj aŭ inter diversaj nekompareblaj nocisistemoj, la problemoj povas kuŝi en la terminologia teorio mem kaj en la nocio de ‘internacia harmoniigo’, kiu ne plu estas praktikebla pro la hegemonio de la angla lingvo; tamen ankaŭ anstataŭigo de angla per Esperanto ne solvus la problemon de internacia terminologio. Ĉar arĥivistaj terminoj helpas internacian komunikon sed ankaŭ malhelpas komunikon kun la ĝenerala publiko, anstataŭ disvolvi apartan arĥivistikan terminaron en Esperanto estas proponata ‘malterminigo’ per interveno en ĝenerallingvaj vortaroj; ankaŭ estas proponataj konsiloj por la transdono de esperantaj arĥivoj al publikaj arĥivistoj.

Ŝlosilvortoj: Arĥivistiko; Terminologio; Kompara semantiko; Etimologio; Internacia harmoniigo

1 Enkonduko

La ekzisto (kaj pretendo) de terminologio kiel fako (kaj ankaŭ scienco) estas bazita sur la koncepto ‘fako’ mem, kiun francemaj kaj anglemaj esperantistoj foje nomas ‘disciplino’ respektive ‘domajno’ kaj terminologoj malofte difinas. En la esperanta terminologia literaturo de mi konata nur Jan Werner (2004) difinas ĝin: “speciala sfero de scioj, agado kaj spertoj de

homa menso, iu branĉo de scienco aŭ labor-kampo de ajna aparta profesio". Fakuloj, tio estas, kulturantoj de aparta fako, havas rajton je propra 'speciala lingvo' aŭ dialekto aparta de la 'ĝenerala lingvo'. La terminologia dialekto, ekzemple, evitas la pli ĝeneralan vorton 'koncepto' favore al 'nocio', kiun Heidi Suonuuti (1998) kaj Werner difinas kiel 'pensunuon' respektive 'unuon de konscio'.

Laŭ Mélanie Maradan (2011), en la ĝenerala aŭ ĉiutaga lingvo la rilato inter vortoj kaj realmondaj objektoj estas 'semasiologia', tio estas, eliras el antaŭekzistanta vorto, kiun parolantoj provas aposteriore difini negative per alproksimiĝo kaj kontrasto kun aliaj, dum en specialaj lingvoj estas 'onomasiologia', tio estas, fakuloj unue identigas kaj listigas la karakterizojn de ĉiu aparta objekto por krei ĝian difinon, kaj nur poste kreas taŭgan nomon por ĝi. Tiusence, la rilato inter nomo, nocio kaj objekto en specialaj lingvoj estus tiel malsama de sia ekvivalento en ĝenerala lingvo ke speciallingvaj vortoj ne estus vortoj sed 'terminoj'. Terminologio do iom similas al kreado de apriora planlingvo, kaj eble tie radikas ĝia sorĉo kaj allogo por esperantistoj, sed estas pli modesta iniciato ĉar limigas sin al vortprovizo de dialekto, anstataŭ krei tute novan lingvon kun sia gramatiko. Ĝi pli memorigas la biblian rakonton pri Adamo nomanta la bestojn de la edena ĝardeno, aŭ la diskutoj pri la arbitreco aŭ natureco de nomoj en la dialogo *Kratilo* de Platono.

Kiel lingvoplanada praktiko, terminologio deklaras sian celon plibonigi komunikadon inter fakuloj, sed kontraŭ la paradoksa prezo, ke ĝi malhelpas komunikadon ekster la fako. Tial, la formiĝo de fakoj estas socia kaj historia fenomeno simila al la formiĝo de lingvoj. Legitimante sian rajton disvolvi propran lingvaĵon, fakuloj ripetas la dramon de Babelo kaj la secesion kiu naskis naciojn el pli vastaj kaj antikvaj lingvaj komunumoj; en alia senco, ili similas al esperantistoj, kiuj ankaŭ disvolvas ekskluzivan lingvaĵon. Aliflanke, tiu ripeta movo estas ankaŭ renversa, ĉar apartigas eliton disde la popolo kaj alproksimigas ĝin al siaj samprofesiuloj el aliaj nacioj, por konsistigi internacian komunumon: do samtempa Babelo kaj Pentekosto, jen dua simileco kun esperantistoj. Dum la secesia motivo de esperantistoj estas nur internacia komunikado mem, fakuloj ankaŭ pravigas sian specialan lingvon per la aserto, ke ĝi staras ekster la arbitra varieco de naciaj kulturoj kaj eble ekster iu ajn kulturo, ĉar pretendas bazi sin sur scienca observado de la objektiva realo, eble sur Naturo mem. Tial internacia harmoniigo de specialaj lingvoj ene de la sama fako estas grava celo en si mem.

Tamen, ne ĉiuj fakoj estas same ekipitaj por legitiigi sian lingvon. Por naturaj sciencoj kiel medicino aŭ teĥnikaj fakoj kiel inĝenierio, la uzo de nekomprenebla ĵargono nur plifortigas ilian jam ekzistantan aŭtoritatecon kaj prestiĝon. En la kazo de lingvistiko kaj juro, la propra lingvaĵo estas

nemalhavebla parto de ilia aŭtonomeco kaj sendependeco. Ekzistas aliaj fakoj por kiuj speciala lingvo estas preskaŭ lukso, ĉar ili apenaŭ leviĝis de la statuso de simplaj metioj kaj ankoraŭ batalas por gajni respekton kaj financadon de la registaroj kaj la ĝenerala publiko; por tiaj fakoj, la malfacileco komuniki ekster siaj limoj estas malavantaĝo pli ol avantaĝo. Unu el ili estas arĥivistiko. Ĉi tiu artikolo fontas el mia sperto kiel novbakita arĥivisto kaj ankaŭ el mia sperto kiel tradukinto de la Universala Deklaracio pri Arĥivoj (CIA s.j.), baza propaganda dokumento de mia fako per kiu arĥivistoj provas komuniki kun la publiko kaj veki pli da atento.

La terminologio de arĥivistiko, kaj ĉefe ĝia nociaro aparte interesas esperantistojn, ĉar en la lasta jardeko pli kaj pli da esperantaj arĥivoj, bibliotekoj kaj kolektoj estas transdonataj al la gardado kaj respondeco de neesperantaj arĥivistoj, kiel la arĥivoj de Universala Esperanto Asocio kaj Esperanto-France. Ĉar la tendenco kreskos, tre gravas por esperantistoj kompreni kiel arĥivistoj pensas kaj kiel esperantistoj aperas al ili. Por faciligi la komunikadon inter arĥivistoj kaj esperantistoj, ĉi tiu artikolo ankaŭ celas meti la bazon de esperanta arĥivista terminologio.

2 Dokumentoj kaj dosieroj

Unue, ni ekzamenus la ĝeneralajn lingvojn por konstati ilian ĥaoson kaj konfirmi, ĉu ankaŭ arĥivistiko bezonas terminologian harmoniigon. Krom la koncepto ‘arĥivo’, kiun ni diskutos poste, ankaŭ aliaj gravas por la arĥiva laboro, el kiuj verŝajne la plej baza estas ‘dokumento’. Ĝi estas tre disvastiĝinta kaj ŝajnas universala, eĉ natura. Kiel derivaĵo de Latino ‘*docere*’ (instrui), en klasika kaj mezepoka Latino ĝi signifis ‘modelon’, ‘ekzemplon’ uzatan por instruado, kaj nur duarange ‘pruvon’. La humanistoj reenkondukis ĝin en la latinidajn lingvojn, tiel frue kiel la 13an jarcenton en la francan kaj katalunan, sed nur kiel kleran sinonimon de ‘instruo’, kaj estis en la latinidaj lingvoj mem kie ĝi evoluis al la moderna ĝenerala signifo, tiel malfrue kiel la 18an jarcenton. Ĝia prestiĝa latina aspekto faciligis ĝian disvastiĝon kaj enkondukon en aliajn lingvajn familiojn, tiel ke ‘dokumento’ eniris tre frue Esperanton kiel ‘internacia vorto’ per apliko de la 15a gramatika regulo de la Fundamento (Zamenhof 1905/1991, 56). Ĉar ĝi ne aperis en la Universala Vortaro de la Fundamento, ni ne disponas Zamenhofan tradukon al la kvin kontrollingvoj de la Unua Libro, sed povas esti certaj ke ĉiuj kvin tradukoj uzus la saman latinan radikon.

La unueco, tamen, estus nur ŝajna, ĉar la vorto ne signifas tute la samon ĉie. En plimultaj nelatinidaj lingvoj la latina radiko ne forbalais indiĝenajn vortojn kun simila signifo, kiel la germana ‘*Urkunde*’, kiuj precizigas kaj malvastigas la signifon kaj uzatecon de la latinaĵo, dum en latinidaj lingvoj

la signifo de ‘dokumento’ estas multe pli ĝenerala ĉar ĝi ne konkuras kun aliaj vortoj. En ĉiu nelatinida lingvo la kontrasto inter latinaj radikoj kaj indiĝenaj ekvivalentoj stabiliĝis unike malsame kaj laŭ malsamaj nuancoj. La angla lingvo provizas bonan ekzemplon. Kvankam devenantaj el la franca, la anglaj vortoj ‘*record*’ kaj ‘*file*’ estas dokumentitaj jam en la 14a respektive 15a jarcentoj, dum ‘*document*’ ne aperas ĝis 1727 kaj ankoraŭ nun estas multe malpli uzata ol la aliaj du vortoj.

Kiel jam montris Ferdinand de Saussure (1916/2022, 124–135), la signifo de vorto dependas de tio kio ĝi ne estas, t. e., de ĝia kontrasto kun najbaraj vortoj. En la kazo de la esperanta ‘dokumento’ la kontrastanto estas ‘akto’, oficialigita en 1909 de la Akademio, sen difino sed kun tradukoj: france ‘*acte (théâtre, document)*’, angle ‘*act, deed*’, germane ‘*Akt (der), Akte (die)*’, pole ‘*akt*’, ruse ‘*акт*’ (Cart 1909, 8). Se la signifo de ‘dokumento’ jam estis svaga, la malprecizeco de ‘akto’ estas ankoraŭ pli evidenta pro la fakto, ke jam en la kvin kontrollingvoj la radiko estas multsignifa. Ĝuste pro la polisemio de tiu latindevena radiko, ĝia koncerna uzo reduktiĝis en ĉiuj lingvoj al tre specifaj kazoj; en la kataluna kaj hispana, ekzemple, ‘*acta*’ estas uzata praktike nur en la senco de protokolo de asembleo aŭ kunveno, dum en la angla ‘*act*’ estas nur leĝo aprobita en parlamento. Ĉar tiel diversaj kazoj ne estas akordigeblaj, la esperanta ‘akto’, bone kontrastanta kun ‘ago’, akiris pli ĝeneralan signifon ol en la kontrollingvoj; rapide stabiliĝis memstara nociaro kiu ne rekte paŭzas difinitan nacian lingvon kaj distingas dokumentojn ĉefe laŭ jura valoro. Jam en 1909 la Plena Vortaro de Émile Boirac (1909) difinis ‘dokumenton’ kiel “sciigan, instruan, pruvan paperon” kaj ‘akton’ kiel “oficialan dokumenton”.

Por serĉi ekzemplon pri la nekomparebleco de la esperanta kaj la naciaj nociaroj, ni denove rigardu al la angla, kaj pli precize al la difino de ‘*record*’ en la Oksforda Vortaro:

I. 1. (Law) The fact or attribute of being, or of having been, committed to writing as authentic evidence of a matter having legal importance, specially as evidence of the proceedings or verdict of a court of justice.
(Simpson kaj Weiner 1989, vol. XIII, 359)

(I. 1. [Juro] La fakto aŭ karakterizo esti registrata aŭ registrita skribe kiel aŭtenta pruvo de afero leĝe grava, precipe kiel atesto de la proceso aŭ verdikto de justica tribunalo.)

Sekve ‘*record*’ tre proksimas al la signifo de ‘akto’ kaj, en la senco de konservinda dokumento, al ‘arĥivaĵo’, kaj ne estas hazardo ke tiu vorto estas pli preferata ol ‘*archives*’, kiu estas pli moderna pruntaĵo, por nomi arĥivejojn publikajn aŭ privatajn: ‘*public records*’, ‘*records office*’, ‘*records*

department' ... Aliflanke, ĉar '*record*' estas multe pli ofta kaj ĝenerala vorto ol '*document*', eblas ankaŭ aserti ke en Esperanto la uzado de '*akto*' kaj '*dokumento*' estas proporcie inversa; tial, la anglaj kaj la esperantaj vortoj ne estas ekvivalentaj.

Arĥivistoj ne laboras nur sur unuopaj aktoj aŭ dokumentoj, sed devas ankaŭ grupigi ilin. Por tiu celo Esperanto disponas nur unu radikon: '*dosiero*', enkondukita pli malfrue ol '*dokumento*' aŭ '*akto*' kaj ankoraŭ atendanta oficialigon. La Plena Ilustrita Vortaro difinas ĝin "*kolekto da aktoj, dokumentoj, notoj, ks, rilataj al unu afero aŭ unu persono, k ordinare entenataj en unu kovertego*" (Waringhien 1970/1987, 67). La mencio pri notoj eĥas la origine vastan signifon de la franca '*dossier*', kiu signifis '*koverton*' kaj nun '*dokumentaron*' pli ol '*aktaron*': kiu ajn povas krei dosieron kolektante dokumentojn rilatantajn al iu temo aŭ persono. Kvankam ĉi tiu franca vorto disvastiĝis internacie, por arĥivistoj pli utilis vorto komparebla al la hispana kaj kataluna '*expediente*' resp. '*expedient*'. Ili indikas la tuton de dokumentoj produktitaj de administracio dum la solvado de unu administra afero, el kiuj ofte estas daŭre konservata nur la lasta decida akto, dum '*serie/série*' estas la tuto de '*expedients*' sisteme produktitaj en la solvado de diversaj aferoj per apliko de la sama administracia normo.

Kvankam francaj arĥivistoj konas kaj uzas la vorton '*série*' en tiu senco, en la franca ne ekzistas rekta ekvivalento de '*expedient*', ĉar la franca '*dossier*' estas simpla dokumentujo kaj ne nepre enhavas aktojn produktitajn per apliko de iu publikjura proceduro. Siaflanke, la angla '*file*' estas komparebla al '*expedient*' ĉar povas esti komprenata de anglalingvanoj kiel ujo aŭ kolekto de paperaj '*records*'; komparebla sed ne ekvivalenta, tial ke '*file*' estas multe pli ofte uzata en la angla ol '*expedient*' en la kataluna, povas indiki ankaŭ privatajn dokumentarojn, kaj povas ankaŭ signifi tutsimple '*dokumentojn*' pli ol '*aktaron*', ĉar preskaŭ ĉiam estas uzata plurale ('*files*'). Eblas do diri ke, kie la kataluna aŭ hispana bezonas nur la vorton '*dokumento*', en la angla necesas elekti inter '*record*', '*file*' kaj '*document*' laŭ la kunteksto. Kvankam anglistoj (ĉar tia -ismo ja ekzistas) laŭdegus tiun riĉecon kiel pruvon ke la angla meritas hegemonion, la sama pedanteco, se renkontita en alia lingvo, kaŭzus plendojn pri arboj kaŝantaj arbaron.

Pro ilia baza nekomparebleco, la provoj internacie harmoniigi la arĥivistajn noci-sistemojn ne estas aparte konvinkaj. En 1994 la Internacia Konsilio pri Arĥivoj eldonis la unuan internacian arĥivistan normon, la Ĝeneralan Internacian Normon pri Arĥiva Priskribo (*International Standard for Archival Description (General)* aŭ ISAD(G), ICA 2000), unue en franca kaj angla, poste en aliaj 15 lingvoj. Ĝi ne nur malakceptis la iberian koncepton pri '*expedient*', sed ankaŭ la vorton '*dokumento*' mem; la franca '*dossier*' kaj angla '*file*' estis egaligitaj kaj hispanigitaj kiel '*unidad documental compuesta*',

dum la plej baza unuo de arĥivaĵoj estas nomita *‘pièce’*, *‘item’* kaj *‘unidad documental simple’*, respektive. La solvoj por la hispana paradokse havas la avantaĝon preteri la jam ekzistantajn vortojn, dum estas malfacile por francaj kaj anglaj arĥivistoj eviti la iluzion de familiareco kaj la influon de la popolaj sencoj kaj uzoj de *‘dossier’* kaj *‘file’*.

Kelkaj terminoj de la ISAD(G) ŝajnas pruvoj artefarite grefti en iun lingvon nociojn kiuj simple ne ekzistas ĉar estas nek uzataj nek komprenataj de la tiulandaj arĥivistoj, kiel la angla *‘series’*. Kiam Michel Duchein (1985, 109–110), ĝenerala inspektoro de francaj arĥivoj, reviziis la unuan internacian arĥivistan terminaron aŭspicitan de la Internacia Konsilio pri Arĥivoj (Evans 1984), li plendis ke traduki *‘série’* kiel *‘record group’* aŭ *‘archive group’* estis tute malĝuste kaj trompe, ĉar la angla arĥivistiko tute simple malagnoskas la nocion de *‘série’*.

La netradukebleco de ĉi tiuj bazaj vortoj kaŭzas kapdolorojn ne nur al arĥivistoj. La unuaj informadikistoj, komprenante *‘record’* kiel *‘dateno’*, decidis nomi bitajn dokumentojn *‘files’*, eble ĉar en la angla la substantiva uzo de *‘document’* estas malofta, dum ĝia verba uzo (*‘dokumenti ion’*) estas pli vigla. Ĝuste por eviti la dubon, ĉu *‘dokumentaro’* estu aro de dokumentoj aŭ aro de instrukcioj por uzi programon (angle *‘documentation’*), la Komputika Leksikono (Pokrovskij 1995) konsilis esperantigi *‘file’* kiel *‘dosiero’*. Certe ankaŭ influis la inerteco kompreni *‘dokumentojn’* nur paperaj. La sama koncepto *‘file’* estis tradukita en la hispanan kiel *‘archivo’*, sed en la francan kaj katalunan kiel *‘fichier’*, *‘fitxer’* (laŭvorte *‘sliparo’*). Kiam iom poste informadikistoj ekuzis la vorton *‘archives’* ankaŭ por iaj specialaj bitaĵoj, komenciĝis granda konfuzo por hispanlingvanoj, dum hispanoj kaj katalunoj ankoraŭ nun apenaŭ uzas la vorton *‘documento’*, *‘document’* por bitaj dokumentoj, kiu tamen estus la plej ĝusta en tiuj lingvoj.

2.1 Harmoniigo: ĉu utopio?

La ĵus reviziita panoramo sufiĉas por montri, kiel varias la vortprovizo disponebla al arĥivistoj en diversaj lingvoj kaj kiel optimisma estas la terminologia teorio pri onomasiologio kaj pri internacia *‘harmoniiigo de nocioj’*. Ĉiu lingvo dividas la realon siamaniere kaj ĉiu divido estas same arbitra ĉar, aparte en homaj agadoj kiel arĥivado, ne ekzistas iu *‘natura’* maniero dividi la mondon. Teorie tiu arbitreco mem faciligus starigon de kompromisa nociaro kaj komuna terminaro; praktike, tiu komuna terminaro estus uzebla nur se la arĥivistoj ekuzus tute novajn terminojn (kiel *‘unidad documental compuesta’*), rifuzante la normalajn indiĝenajn vortojn kaj rezignante komunikon kun la publiko, dum mi jam avertis ke multaj fakoj kiel arĥivistiko socie ne povas permesi tion al si. Plia baro al iom-post-ioma

konfluigo de naciaj terminaroj en unu saman noci-sistemon estas la lokaj normoj kaj leĝoj, kiuj fundamentas la praktikojn de arĥivistoj restante ekster ilia kontrolo kaj variante de jurisdikcio al jurisdikcio.

Kompari la artefaritecon de ISAD(G) kaj de ĝiaj difinoj kun Esperanto ne estas simpla metaforo. Ne estas hazardo, ke la koncepton pri ‘harmoniigo de nocioj’ elpensis esperantisto, Eugen Wüster (1979, § 8.2.1.5), fondinto de terminologio. Praktika terminologia laboro nepre devas esti malpli ambicia. Evans (1984) kaj Walne (1988) nur povis kompari la francan kaj anglan vortprovizojn substrekante la malsimilecojn; tamen Duchein (1985) bonvenigis la novan vortaron “atendante la ekeston de iu arĥivista esperanto kiu ne alvenos morgaŭ”.

La ‘arĥivista esperanto’ neniam alvenos. Intertempe, la ekskluziva uzado de la angla en akademiaj interŝanĝoj plifortikiĝis kaj nun la ‘harmoniigo de nocioj’ estas simpla tradukado de anglaj vortoj kaj difinoj al aliaj lingvoj. Esploristoj en anglalingvaj universitatoj, pli bone financataj, estras ĉiujn internaciajn esplorgrupojn trudante siajn prioritatojn, lingvon kaj konceptojn. En 2024, kiel volontulo, mi partoprenis laborgrupon de la Kataluna Arĥivista Asocio por katalunigi la glosaron pri arĥivistiko kaj artefarita inteligento disvolvata de la laborgrupo InterPARES (2024), kiun kunordigas profesoroj de la Universitato de Brita Kolumbio; mi estis la sola partoprenanto kun lingvistika edukiĝo, kaj la sola kiu proponis konsiliĝi kun Termcat (2026), la terminologia agentejo de la kataluna registaro. Kiam mi provis adapti la terminojn kaj iliajn difinojn al pli normala uzo de katalunaj vortoj, oni avertis min ke la “instrukcioj” estis nur rekte traduki. Pli kaj pli disvastiĝas la antaŭjuĝo, ke la angla lingvo en si mem estas strukture kaj kulture pli riĉa kaj taŭga por scienco. Konata usona profesorino vortumis tiun opinion tre eksplicite:

Significant new and linguistically nuanced archival terminology has been coined in English, a richly expressive language [...] but it is unclear how, if at all, such concepts and the words through which they are expressed might translate into other languages or to countries with very different archival experiences. Difficulties immediately arise when translating complex and socio-politically-contingent concepts from English into Croatian, a linguistically less rich minority language, but one where quite different professional concepts using similar terminology already exist.
(Gilliland kaj Štefanac 2018)

(Rimarkinde nova kaj lingve nuancita arĥiva terminologio estas kreita en la angla, riĉe esprimpova lingvo [...], sed ne klaras kiel, se entute, tiuj konceptoj kaj la vortoj esprimantaj ilin povas esti tradukataj en aliajn lingvojn aŭ en landoj kun tre malsamaj arĥivaj spertoj. Tuj aperas

malfacilaĵoj en la traduko de kompleksaj kaj socipolitike kontingencaj konceptoj el la angla al la kroata, lingvistike malpli riĉa minoritata lingvo, en kiu tamen jam ekzistas sufiĉe malsimilaj profesiaj konceptoj uzantaj similajn terminojn.)

Estas sufiĉe surprize, ke tiun frazon kunsubskribis kroatino. Anglakapablaj profesoroj en la lingva periferio fariĝas kolonia peranto, kiu transdonas al siaj malpli kosmopolitaj samlandanoj la teoriojn fabrikatajn kaj disvendatajn el la prestiĝaj universitatoj de la lingva centro por loka konsumado. Multaj praktikantaj arĥivistoj, tamen, estas sane konservativaj kaj skeptikaj rilate al la konfuzaj teorioj disvastigataj de universitatoj en fremda lingvo. Tion paradokse konstatis la sama profesorino:

The pressure for academics to publish in English and in international journals can also result in ruptures of what we maintain should be an organic relationship between the academic field and professional practice, where the professional field increasingly does not read the same literature, attend the same conferences and institutes, or even work or publish in the same languages. (Gilliland, McKemmish kaj Lau 2016, 29)

(La premo por ke universitatoj publikigu en la angla kaj en internaciaj revuoj ankaŭ povas kaŭzi rompojn en tio kio nia opinie devus esti organa rilato inter akademia agado kaj profesia praktiko, kie la profesiuloj ne plu legas la saman literaturon, partoprenas la samajn konferencojn kaj institutojn, aŭ eĉ laboras kaj publikigas en la samaj lingvoj.)

Kiel la esperantista propagando, la teorio de terminologio formiĝis antaŭ la ‘fina venko’ de la angla kaj akre malharmonias kun la nuntempa socikultura realo. Aliflanke, anstataŭigo de la angla per Esperanto evitus lingvan imperiismon sed ne solvus la defion de internacia terminologio. Ĉar Esperanto ne estas apriora onomasiologia lingvo, ĝia baza vortprovizo disponebla al arĥivistoj formiĝis hazarde, kreante unikan miksaĵon. Plie, se oni enkondukus novajn vortojn por nocioj el plej diversaj arĥivistaj tradicioj kiel ‘*expediente*’ aŭ ‘*file*’, la vortprovizo de Esperanto fariĝus tiel precizega, giganta kaj neuzebla kiel se oni volus enkonduki la nomojn de ĉiuj pladoj el ĉiuj naciaj kuirartoj (kio estis foje nomita ‘la bujabesa sindromo’). Estas evidente ke Esperanto, kiel ĉiuj lingvoj, kuntrenas sian bildon de la mondo kaj ne povas neŭtrale peri ĉiujn aliajn, same kiel esperantistoj havas sian propran kulturon.

2.2 Naskiĝo kaj kresko de koncepto: ‘arĥivo’

Konstatinte la diversecon de la nacilingvaj noci-sistemoj, estas jam tempo meti sub la sama lupeo la plej gravan koncepton por arĥivistoj: ‘arĥivo’ mem. Unuarigarde, kiel ‘dokumento’, ĝi ŝajnas ne bezoni internacian harmoniigon, danke al la vasta uzo de unu sama radiko: ‘arĥiv’. Ĝi kaj ĝiaj derivaĵoj estas universale uzataj tra la tuta Eŭropo kun tre malmultaj esceptoj (la hungara, la islanda, la irlanda, la litova), kaj disvastiĝis ankaŭ ekster Eŭropo, ekzemple al la araba, la hebrea, la persa, la bengala, la indonezia, la tagala kaj la japana, inter aliaj.

Por kompreni ĝian originan signifon, necesas nun ekzameni la etimologion. ‘Arĥiv-’ devenas tra la postklasika Latino ‘archivum’, de la malnovgreka ἀρχεῖον (arĥéjon). “Arĥéjon” estis la ĝenerala nomo por la oficejoj de la arĥontoj, ĉefaj magistratanoj en la grekaj civitoj, kaj sekve havis sencon najbaran al tiu de la moderna ‘urbodomo’. Ateno havis naŭ arĥontojn, kaj ĉiu el ili havis sian propran ‘arĥéjon’, kie laboris kaj gardis la aktojn de sia ofico por regula uzado. La plej grava ‘arĥéjon’ estis la *Metroon*, kie estis gardataj la aktoj de esencaj decid-organoj de la civito kiel la *Bulé* kaj la *Ekklesia*, ekvivalentaj al parlamento; konstanta ĉiutaga konsultado de tiuj aktoj estis nepra kondiĉo por la normala funkciado de la atena demokratio.

La etimologio mem substrekas la administran funkcion de la ‘arĥéja’: ‘arĥonto’ signifas laŭvorte ‘reganto’ kaj devenas de la sama verbo kiel ‘arĥéjon’: ἀρχω (árĥō), ‘regi’ aŭ ‘mastrumi’. De tiu radiko devenas ankaŭ tiel konataj esperantaj vortoj kiel ‘monarĥio’, ‘anarĥio’, ‘oligarĥo’, ‘hierarkio’, kaj aliaj. En sia origino do, la vorto indikis la normalan mastrumadon de dokumentoj, necesan por la administrado de la civito mem. Atentu, ke ne temas pri greka apartaĵo, ĉar ankoraŭ nun arĥivistoj vidas en tio sian ĉefan laboron. Ĉiu organizo publika aŭ privata, eĉ la plej malgranda, kreas dokumentojn kiujn devas mastrumi por fari ilin troveblaj kaj utiligeblaj; en tiu senco, ankaŭ ĵus kreita dokumento kuŝanta sur skribotablo estas arĥivaĵo, kaj simplaj operacioj kiel registrado, identigado kaj klasifikado (kion anglalingvanoj nomus ‘filing’) estas arĥivado.

Dum la Eŭropa Mezepoko, kiam la povo de la ŝtatoj, la ofteco de legokapablo kaj la produktado de dokumentoj draste reduktiĝis, la vorto ‘arĥivo’ malaperis, ankaŭ en latinidaj landoj. La humanistoj reenkondukis ĝin dum la Renesanco jam en la 14a jarcento en la itala kaj kataluna lingvoj, en la 15a en la franca, sed tiel malfrue en la hispana kaj la angla kiel 1560 respektive 1638. Tiam ĝia signifo ŝanĝiĝis, ĉar la socia rolo de la reenkondukantoj koloris ĝiajn nuancojn: ĝi ne tiom estis vorto ligita al publika aŭ privata administrado kiom al la klasika heredaĵo, al historia klereco, kaj povis eĉ havi negativan sencon, de io malnova kaj senutila.

Ĝi asociiĝis al vortoj kleraj kaj similtajn same enkondukitaj de humanistoj kiel ‘arĥaika’, ‘arĥeologio’, ‘arĥetipo’, ktp. Ironie, la asociigo estis prava, ĉar tiuj vortoj vere devenas de la sama greka radiko ‘*árĥō*’, kiu signifas ‘regi’ sed en la senco ‘esti la unua’ aŭ ‘antaŭiri’, tiel ke ἀρχή (‘arĥé’) povis signifi samtempe ‘komencon’ kaj ‘regadon’. La eldono de 1718 de la Vortaro de la Franca Akademio, ekzemple, bone respegulis tiun asociigon en sia difino de ‘*archives*’:

Anciens titres, chartres, et autres papiers importants. Il se dit également Du lieu où l’on garde ces sortes de titres. (Académie française 1719)

(Antikvaj atestoj, ĉartoj, kaj aliaj gravaj paperoj; loko kie oni gardas tiajn atestojn.)

Malgraŭ la kromnuancoj, unu grava parto de la signifo estis konservita: la nomo ‘arĥivo’ aplikiĝis ĉefe al publikaj aktoj, ĉar nur la publika fido atribuita al la ŝtato kaj ĝiaj reprezentantoj povis garanti la aŭtentecon de arĥivaĵoj antaŭ ĉiuj civitanoj. La publikaj aktoj meritis fidon ĉar estis gardataj en speciala loko, sub la respondeco de ŝtato-ficistoj ligitaj de speciala ĵuro, alireblaj al la publiko nur sub ilia kontrolo, kaj sekve ne falseblaj. Arĥivistoj estis servantoj de la povo, kaj tipa arĥiva operacio – klasifikado – fariĝis eŭfemismo de ‘sekretigo’.¹ Ĉar aŭtentecon garantiis la gardejo, en la komenco, la sama vorto ‘arĥivo’ indikis la publikan domon kie la aktoj estis gardataj kaj la aktojn mem. Privataj organizoj kaj privatuloj povis gardi aktojn, sed ne havis ‘arĥivojn’ ĉar mankis al ili publika fidindeco. Sekve, kiel en Grekujo, arĥivoj plu estis unu el la fundamentoj de la ŝtata povo, kion la Vortaro de la Franca Akademio agnoskis nur en 1835 aldonante plian difinon:

Il se dit aussi, dans les Administrations publiques, Des anciennes minutes, des pièces et documents que l’on rassemble et que l’on garde pour les consulter au besoin, ainsi que Du lieu où ils sont déposés. (Académie française 1835)

(Ankaŭ tiel nomiĝas, en la publikaj administracioj, la antikvaj protokoloj, aktoj kaj dokumentoj kolektitaj kaj gardataj por konsulti ilin laŭ neceso, kaj la loko kie ili estas konservataj.)

Tia kompromiso bone spegulas la du funkciojn de arĥivoj: la administran kaj la historian. Pli ol antikvecon, arĥivistoj distingas la ‘du valorojn’ de arĥivaĵoj. La unua estas la praktika aŭ administra, kiu estas la celo de ilia kreado, ĉar aktoj ne estas kreataj por simple klerigaj aŭ informaj celoj,

1 Ankoraŭ nun en la angla ‘classified’ signifas ‘sekreta’.

malkiel publikigataj libroj aŭ revuoj: ili celas havi efikojn en la reala mondo. Nur poste, kiam ilia praktika aŭ leĝa valoro kadukiĝas (kaj tio ne estas iu fiksa periodo sed por ĉiu aparta speco de akto varias de monatoj ĝis jardekoj aŭ jarcentoj, laŭ la leĝo koncernanta ĝin), ili estas detruataj aŭ konservataj laŭ tio, ĉu ili akiris la 'duan valoron', kiu estas la pure informa, utila por historiistoj.

2.3 La kreo de naciaj memoroj

Ĉio ĉi ŝanĝiĝis pro la Franca Revolucio. Kiam nobelaj feŭdoj, religiaj ordenoj kaj la monarĥio mem estis abolitaj, kune kun iliaj posedaĵoj ankaŭ iliaj arĥivoj estis konfiskitaj por faciligi la ekonomian ekspluatadon de la konfiskitaj posedaĵoj, sed ankaŭ por ideologie pravigi la novan reĝimon. Burgaj historiistoj el la revoluciinta klaso celis pruvi la ekziston kaj antikvecon de nova estaĵo, la Nacio. Dum reĝoj ricevis sian suverenecon de Dio, la suverenecon de la nova ŝtato pravigis la Nacio. Necesis pruvi ke la Nacio ne estis elpenŝaĵo de la Revolucio sed realaĵo devenanta de la plej fora tempo tra la tuta nacia teritorio. Sekve, ĉiuj antikvaj dokumentoj utilis por verki tian ĉioampleksan nacian historion kaj fari ke la pasinteco estu komprenebla nur de naciisma vidpunkto. Por servi la historiistojn estis kreitaj naciaj arĥivejoj kiuj estis ankaŭ arĥivaroj, ĉar kunigis arĥivojn de tre diversaj kreintoj, ne nur en Parizo sed tra la tuta lando: nun ĉiuj publikaj arĥivejoj povis akcepti arĥivojn de nobeloj, religiaj institucioj aŭ privataj organizoj, se ili havis historian intereson; ili fariĝis kolektoj de naciaj heredaĵoj. Baldaŭ poste ili akceptis ankaŭ dokumentojn de gravaj unuopuloj, ekzemple famaj politikistoj.

Kiam la novaj naciaj arĥivejoj komencis amasigi dokumentojn de malsamaj devenoj, aperis la unuaj profesiaj arĥivistoj kaj samtempe novaj metodologiaj kaj terminologiaj defioj. La arĥivistoj baldaŭ komprenis, ke necesis disvolvi novajn metodojn malsamajn de tiuj de bibliotekistoj: ne havis sencon rangi ĉiujn dokumentojn laŭ temo, loko aŭ dato sendepende de ilia deveno, ĉar tre ofte, kiam mankis informo en la unuopa dokumento (ekzemple la dato) por ilia kompreno, kompletigo kaj uzo tre helpis scii, el kies arĥivo ĝi devenis kaj kun kiuj aliaj dokumentoj havis rilaton. Tamen la franca lingvo ne helpis vortumi kaj kompreni tiun principon, ĉar la franca vorto '*archives*' estas ĉiam ingenra kaj plurala; kiel montras la jam cititaj vortaraj difinoj, '*archives*' fakte signifas 'arĥivaĵojn' aŭ 'arĥivejon' pli ol 'arĥivon' aŭ 'arĥivojn'. Kiel diri france "en la nacia '*archives*' oni ne rajtas miksi '*archives*' el malsamaj '*archives*' "?

Necesis termino por distingi unuopan arĥivon apud aliaj, aparte tiun transdonitan al publika arĥivejo, disde ‘arĥivaĵoj’ kaj ‘arĥivejo’. La vorto elektita estis ‘*fonds*’. Kiel la esperanta ‘fonduso’, ĝi devenas de latina vorto origine signifinta ‘bienon’ kaj poste, pli ĝenerale, ‘kapitalon’, ‘posedaĵon’ aŭ ‘havaĵon’. Ĝi jam estis uzata en bibliotekoj kaj muzeoj por paroli pri iliaj ‘havaĵoj’, sed por distingi la specifan arĥivistan sencon de ‘arĥivaĵoj kun sama deveno’, sufiĉis precizigi ĝin kiel ‘*fonds d’archives*’. Siavice, la nocio ‘arĥivejo’ estis esprimebla laŭbezzone kiel ‘*dépôt d’archives*’ kaj ‘arĥivaĵo’ kiel ‘*pièce d’archives*’. Tiel, kvankam ‘*fonds*’ estis origine bibliotekista esprimo kaj tiel plurala kiel ‘*archives*’, ĝi permesis distingi en publikaj arĥivejoj—kiuj jam estis ankaŭ arĥivaroj—la pli malaltan nivelon de unuopa arĥivo, kaj en 1841 ebligis al franca ĉefarĥivisto Natalis de Wailly ordoni la principon de ‘*respect des fonds*’, tio estas, la principo ke oni ne miksu dokumentojn de malsamaj devenoj. Lian cirkuleran ordonon ankoraŭ nunaj arĥivistoj tra la tuta mondo rigardas sia fondoĉarto kiel aparta fako.

Tiu estis la komenco de arĥivistika terminologio. La arĥivista kompreno de ‘arĥivo’ estis kodigita ne per la ĝenerallingva vorto ‘*archives*’, tro multsignifa kaj ambigua, sed per ‘*fonds*’. Pro la internacia influo de la franca arĥivistiko, la nocio ‘*fonds*’ estis enkondukita ankaŭ en aliajn lingvojn, pli aŭ malpli adaptita: la hispana kaj itala (‘*fondo*’), la kataluna (‘*fons*’), la portugala (‘*fundo*’), la rumana, kroata kaj ĉeĥa (‘*fond*’), la serba kaj rusa (‘фонд’), la angla kaj kimra (‘*fonds*’), kaj eĉ la japana (フオンド / fondo). Foje la nova signifo estis aldonita al jam ekzistanta vorto (kiel la pola ‘*zespół*’, laŭvorte ‘grupo’), foje la tuta franca vorto estis adoptita kiel neologismo. Ĝi ŝajnis tiel internacia, ke estis uzita en ISAD(G), kiu tradukas la samajn difinojn al diversaj lingvoj. Jam estas momento esplori kio estas por arĥivistoj ‘arĥivo’, tio estas, ‘*fonds*’, laŭ la angla kaj franca versioj de ISAD(G):

The whole of the records, regardless of form or medium, organically created and/or accumulated and used by a particular person, family, or corporate body in the course of that creator’s activities and functions.
(ICA 2000, 10)

(Tuto da arĥivaĵoj, de ĉia formo kaj materialo, organe kreata kaj/aŭ amasigata kaj uzata de iu homo, familio aŭ organizo dum ties agadoj kaj funkciadoj.)

Ensemble des documents quels que soient leur type et leur support, créé ou reçu de manière organique et utilisé par une personne physique ou morale, dans l’exercice de ses activités.
(CIA 2000, 11)

(Aro da dokumentoj de ĉia speco kaj materialo, organe kreata aŭ ricevata kaj utiligata de fizika aŭ jura persono, dum la ekzercado de siaj agadoj.)

En franclingvaj kaj najbaraj landoj la vorto '*fonds*', origine pruntita de bibliotekista lingvaĵo, tiel ensorbis la arĥivistan nocion, ke bibliotekistoj readoptis ĝin en la senco de 'speciala librokolekto, kutime donacita'. Tial, kiam la 31an de Decembro 1975 la urba biblioteka komisiono de Kortrejko (Flandrujo) "oficiale" akceptis la imponan esperantan librokolekton donacitan de Cesar Vanbiervliet, en solena letero al la loka esperanta klubo La Konkordo ĝi donis al la kolekto la titolon "Esperanto Fonds Cesar Vanbiervliet", kiu laŭ ili signifis "daŭran konservadon kaj leĝan protekton".² La nomo estis tuj esperantigita kiel 'Esperanto-Fondaĵo'. Malgraŭ tiu promeso, la vorto '*fonds*' estas praktike neuzata kaj nekomprenebla en la nederlanda kaj la bibliotekistoj nur pretendis, ke ĝi estas faka bibliotekista aŭ jura termino, kio fakte ĝi ne estas – ĝia uzo inter bibliotekistoj estas tute neformala kaj ne kodigita en internaciaj normoj kompareblaj al ISAD(G). Tial, kiam en 2011 la urbo decidis ke ne plu volas esperantaĵojn, ĝi povis simple ordoni al esperantistoj vakigi la spacon. Bibliotekoj – krom specialaj heredaĵaj bibliotekoj – ne povas protekti librokolektojn en la sama senco kiel arĥivojn arĥivistoj. Arĥivistoj akceptas arĥivojn nur ricevante ankaŭ la leĝan proprieton de la dokumentoj per skribita akto kun inventaro de la enhavo. Nur kiam arĥivaĵoj fariĝas publika posedaĵo komencas protekti ilin la leĝoj kaj normoj de publikaj arĥivejoj, inter ili '*respect des fonds*', dum simple donacitaj libroj en biblioteko restas ĉiam en leĝa limbo. Jen plia kialo, por ke esperantistoj varbu publikajn arĥivistojn en la konservado de esperanta heredaĵo.

2.4 Esperanta terminigo de la nocio '*fonds*'

Necesas jam nun konsideri, kiel la termino eniru la esperantan vortprovizon, decidante ĉu '*fonds*' estas sufiĉe internacia por esti esperantigata laŭ la 15a regulo de la Unua Libro kaj, en tiu kazo, sub kiu formo. Mia persona opinio kontraŭas la uzon de la jam ekzistantaj radikoj 'fond-' aŭ 'fondus-' aŭ la enkondukon de ia neologismo, kaj favoras la simplan uzon de la jam konata kaj uzata vorto 'arĥivo' por esprimi tiun nocion. La kialoj estas pluraj.

- (1) La fleksebleco kaj reguleco de Esperanto faciligas derivi vortojn por la supera institucia nivelo ('arĥivejo', 'arĥivaro') kaj rezervi la radikojn 'arĥivo' al la arĥivista nocio de '*fonds*' kiel unuo de deveno, sen distingi tion, ĉu ĝin gardas ankoraŭ ĝia produktanto aŭ ne plu.

² La originalan leteron mi trovis skanita en la retejo de la Fondaĵo Cesar Vanbiervliet (Esperanto-Kortrijk 2021a), sed ĝi ŝajnas ne plu trovebla.

- (2) La bezono enkonduki novan vorton ŝuldiĝis nur al la hazarda historia okazo, ke la nocio estis unue esprimita de francoj, kies vorto por 'arĥivo', ĉiam plurala, malhavis veran pluralon, dum Esperanto perfekte povas distingi 'arĥivon' disde 'arĥivoj'.
- (3) La formala kontrasto inter termino kaj ĝenerallingva vorto ne estas sentata kiel necesa en lingvoj kies vorto por 'arĥivo' regule fleksiĝas ankaŭ plurale, ekzemple la nederlanda ('*archieff/archieven*') aŭ la germana ('*Archiv/Archive*'), kaj sekve ne adoptis '*fonds*'; tio pruvas ke ne necesas nova termino.
- (4) Lingvoj kiuj regule fleksias la vorton 'arĥivo' kaj tamen adoptis '*fonds*' (ĉefe la latinidaj) estas nur tiuj, kie komune uzata vorto derivita de '*fundus*' jam ekzistis kaj simple alprenis novan signifon.
- (5) En multaj lingvoj kiuj laŭ ISAD(G) ŝajne adoptis '*fonds*', ĝi fakte estas nur vortara termino kiun lokaj arĥivistoj nek komprenas nek uzas, ĉar ĝia enkonduko estas tro moderna aŭ ĉar la nocio mem ne ekzistas en iliaj landoj pro historiaj kialoj tuj klarigotaj. Jam Hilary Jenkinson (1937, 18), dojeno de britaj arĥivistoj, demandis: "Kiu bone tradukos en anglan la vorton '*fonds*'?". Poste ankaŭ Theodore Schellenberg (1956), dojeno de la usonaj, avertis ke "'*records group*' ne estas la samo kiel '*fonds*'", kvankam multe pli poste Duchein (1985, 109) asertis la malon kaj plendis ke Evans kaj Walne ne tradukis unun per la alia. Ankoraŭ nun '*fonds*' restas tute ne uzata en anglalingvaj landoj, krom eble dulingva Kanado.
- (6) Kvankam Esperanto posedas la radikojn 'fond-' kaj sekve estus en la sama klaso kiel la latinidaj lingvoj, jam ekzistas tiom da signifoj kaj ambigueco en la uzo de tiu radiko ke malkonsilindas aldoni pli. En tipa esperanta uzo, 'fondaĵo' povas esti (laŭ PIV) ne nur "establejo kreita por speciala, ordinare socia, celo k provizita per sufiĉa kapitalo aŭ rento por povi daŭre funkciadi", do organizo kun jura personeco kiel Esperantic Studies Foundation aŭ FAME-Fondaĵo, sed ankaŭ "kapitalo destinita por aparta, difinita celo" kiel la multaj fondaĵoj de UEA (Canuto, Wüster, Belarta Fondaĵo...), kiuj laŭ PIV estas fakte 'fondusoj'.
- (7) La uzo de '*fonds*' en arĥivista senco estis nur metaforo kiun arĥivistoj imitis de bibliotekoj kaj muzeoj, sed esperantistoj ne uzas la vorton 'fonduso' por signifi la havaĵojn de bibliotekoj aŭ muzeoj; kontraŭe, ĝis nun ĝi havis nur ekonomian signifon, kaj aldoni alian tute senrilatan kaŭzus konfuzon.

- (8) Kiel vidite en la kazo de la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet, la vorto '*fonds*' ne estas pure arĥivista termino, ĉar en kelkaj landoj bibliotekistoj miskomprenas kaj malĝuste aplikas ĝin. Nur terminigo de 'arĥivo' evidentigus, ke temas pri arĥivista nocio.
- (9) Fakaj terminoj kiel '*fonds*', krom ne multe utili al arĥivistoj mem ekster franclingvaj landoj, rekte malutilas al arĥivistaj provoj komuniki kun la ĝenerala publiko kiel la Universala Deklaracio pri Arĥivoj, en kiuj nur 'arĥivo' estas komprenebla.

2.5 La du arĥivistaj tradicioj

Kvankam francaj arĥivistoj limigis la signifon de '*archives*' per la nocio '*fonds*', samtempe ili ĝeneraligis la signifon kaj uzatecon de '*archives*'. Fakte, la kreo de la nocio '*fonds*' estis rekta rezulto de la malstriktigo de '*archives*' kaj ĝia apliko al privataj dokumentoj, kiuj estis akcepteblaj en publikajn arĥivejojn por fariĝi '*fonds*' nur se ili jam estis difineblaj kiel '*archives*' antaŭ sia eniro. Subite, publika jura valoro ĉesis esti esenca karakterizo de arĥivaĵoj, kaj dokumentoj de privataj organizoj, establoj kaj asocioj povis esti nomataj 'arĥivoj' apud tiuj de la ŝtato: ĉiuj utilis por doni vastan portreton de la naciaj karaktero kaj animo. La napoleonaj armeoj etendis tiun plivastigon de la koncepto 'arĥivo' en multajn landojn de ili konkeritaj, aparte en latinidajn landojn. Ĉie kie la nova reĝimo naskiĝis per invado aŭ revolucio kaj konfisko de malnovaj arĥivoj, estis fonditaj naciaj arĥivejoj kiuj kolektis ankaŭ privatajn aktojn kaj dokumentojn kun historia valoro, kaj la signifo de 'arĥivo' pliampleksiĝis.

Kontraŭe, en landoj kie la transiro al liberalismo estis pli laŭgrada kaj malpli tempesta, kiel en ĝermanaj landoj, privataj organizoj konservis siajn aktojn; kiam ili malfondigis, kiuj akceptis ilian dokumentan heredaĵon kaj disponigis ĝin al esploristoj estis universitataj aŭ lokaj bibliotekoj, pli ol publikaj arĥivejoj, kiuj ne kutimis kolekti privatajn heredaĵojn kaj ne fariĝis arĥivaroj. Foje amatoraj historiistoj mem kolektis kaj konservis forlasitajn arĥivojn, fondante historiajn societojn. Tial, kiel jam vidite, Jenkinson neis la kompreneblecon de '*fonds*' al britoj, kaj ankaŭ Schellenberg ne trovis ilin en publikaj usonaj arĥivejoj. Tio limigis ankaŭ la difinon de 'arĥivo', ĉar ĝermanlingvanoj ne tute kredis ke privataj individuoj kaj organizoj kapablas produkti validajn arĥivojn, kiel rimarkigas la artikolo pri '*fonds*' en la *Encyclopedia of archival science*: "Jenkinson, kiel Muller, Feith kaj Fruin antaŭ li, ne kredis ke privataj arĥivoj havas organan naturon, dum Duchein ja kredis, laŭ la franca tradicio" (Banat-Bergère kaj Nougaret 2015). La sama artikolo konfesas ke "la disvolviĝo de internaciaj normoj plifavoris la francan terminon '*fonds*', intence elektitan por eviti ian terminologian konfuzon [...] en la nord-amerika praktiko".

Tiel en Okcidento ekestis du arĥivistaj tradicioj aŭ tendencoj, en kiuj la vorto ‘arĥivo’ mem ne havas la saman signifon. La kontrasto de la du tradicioj rimarkeblas jam en fondaj tekstoj de arĥivistiko kiel la tiel nomata ‘Nederlanda Manlibro’, publikigita en 1898 de Muller, Feith kaj Fruin. Ĝi baldaŭ estis tradukita al la germana, itala kaj franca en 1905, 1908 kaj 1910, respektive, ĉar per la unua fojo unu sola manlibro kompilis la tutan doktrinon de tiama arĥivistiko, kaj la aŭtoroj ankaŭ provis unuigi la francan kaj germanan tradiciojn; ekzemple, ili koncedis, ke ankaŭ privataj organizoj kaj entreprenoj produktas arĥivojn. Tamen ĝi malakceptis la arĥivecon de familiaj dokumentoj:

De stukken van een familie-archief vormen geen geheel, zij zijn meermalen op de meest zonderlinge wijze bijeengekomen en missen het organisch verband van een archief in de beteekenis, daaraan in deze handleiding gegeven. De regels voor gewone archieven kunnen daarom op familie- of huisarchieven niet toegepast worden.

(Muller, Feith kaj Fruin 1920, 6)

(Dokumentoj en familia ‘arĥivo’ ne konsistigas tuton; tre ofte ili estas kunigitaj plej strange kaj malhavas la organan ligon de arĥivo en la senco al ĝi donita en ĉi tiu manlibro. La reguloj por ordinara arĥivoj, sekve, ne estas aplikeblaj al familiaj arĥivoj.)

Ĉi tio tiel konfliktis kun la pli vasta kompreno de arĥivoj ke jam la unua tradukinto, por escepti el tiu rigora kriterio almenaŭ la arĥivojn de nobelaj familioj, aldonis piednoton, kiun reproduktas ankaŭ postaj tradukoj kiel la angla de 1940. Familioj estis oficiale akceptitaj kiel validaj produktantoj de arĥivoj (en arĥivista terminologio kiel ‘deveno’ aŭ angle kaj france ‘*provenance*’) nur kiam la ISAD(G) fine akceptis la organecon de dokumentaroj produktitaj de “persono, familio aŭ organizo” en sia angla versio.³ Kaj ankaŭ nun, la angla vorto ‘*archives*’ estas rezervita al instituciaj arĥivoj, dum familiaj kaj personaj arĥivoj estas nomataj ‘*collections*’, ‘*papers*’ aŭ ‘*manuscripts*’. En la germana lingvo instituciaj arĥivoj estas ‘*Archiv*’ (plurale ‘*Archive*’), dum la ceteraj estas ‘*Nachlass/Nachlässe*’ (aŭ ‘*Vorlass/Vorlässe*’ se la produktinto testamente heredigis ĝin antaŭ sia morto). Se la produktinto aŭ iliaj heredintoj plu gardas la materialojn, germanoj nomas ilin ‘*Sammlung*’ (‘kolekto’) ankaŭ se ili estas persone produktitaj pli ol kolektitaj. Foje la sama distingo inter publikaj kaj privataj arĥivoj estas

3 Kiel videblas en la antaŭa citaĵo, la franca difino de ISAD(G) por ‘fonds’ mencias nur “fizikajn kaj jurajn personojn”, sed familioj estas inkluzivitaj en la difino de ‘producteur d’archives’; la plimultaj aliaj versioj de ISAD(G) kopias la anglan difinon de ‘fonds’.

aplikata en Esperanto, ekzemple en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, kie donacitaj personaj arĥivoj estas nomataj ‘postlasaĵoj’ kaj ‘antaŭlasaĵoj’; ambaŭ esprimoj estas rektaj tradukoj el la germana.

Solvinte la dubon pri ‘*fonds*’, la dua defio por disvolvi esperantajn arĥivistajn terminojn estas elekti difinon por la nocio ‘arĥivo’ konsiderinte la dividon de la latinidaj kaj ĝermanaj tradicioj. La sola realisma solvo estas adopti la pli vastan latinidecan komprenon de ‘arĥivo’, kiu ne distingas publikan kaj privatan devenon. La unua kialo estas ke la Internacia Konsilio pri Arĥivoj jam faris tion, ne nur per la difinoj de terminoj en ISAD(G), sed ankaŭ en la Universala Deklaracio pri Arĥivoj, kiu ne difinas arĥivojn sed deklaras ilian funkcion jena: “Arĥivoj registras decidojn, agojn kaj rememorojn.” La inkluzivo de afero tiel subjektiva kiel rememoroj (angle ‘*memories*’) aludas al socia funkcio kiun publikaj aktoj solaj ne povas plenumi (Fernández Asensio 2025). La cetero de la DUA eksplicite mencias “publikajn kaj privatajn arĥivojn” kaj agnoskas “la diversecon de arĥivoj, ebligantan dokumenti ĉiujn kampojn de homa agado”. Ankaŭ la respondeculoj pri disvastigo de la UDA de IKA eksplicite asertis, ke

The UDA was developed concurrently in English and French, so it does not present the English concept of records.

(Roberto, Anderson, kaj Crockett 2021)

(La UDA estis disvolvita samtempe en la angla kaj la franca, kaj ne redonas la anglan koncepton de arĥivoj.)

Dua pli grava kialo estas ke, dum ekzistas internacia vorto por publikaj arĥivoj, ĉiu lingvo nomas la privatajn arĥivojn laŭ siaj propraj kutimoj: ni jam vidis ke la germana kaj la angla uzas tute malsamajn nomojn por ili. Malfacilas internacia interkompreniĝo se ĉiu esperantigos rekte el sia lingvo la nomojn uzatajn por privataj arĥivoj.

2.6 Arĥivo ne estas kolekto! Aŭ ĉu tamen?

La paralelo inter angla ‘*collection*’ kaj germana ‘*Sammlung*’ ŝajnas sugesti alternativan internacian nomon por privataj arĥivoj, sed ne vere estas tiel, ĉar por arĥivistoj (almenaŭ la konservativaj) ‘kolekto’ tute ne povas esti samtempe ‘arĥivo’. La afero meritas detalan klarigon. Ni rememoru la strukturismon de Saussure: vortoj signifas nur per kontrasto kun aliaj. Kaj ĝuste la koncepto mem pri ‘arĥivo’ bezonas por sia ekzisto diametre kontrasti kun sia antonimo ‘kolekto’. Jen la difino de ‘kolekto’ (‘*collection*’) laŭ la angla kaj franca versioj de ISAD(G), plus mia sinteza traduko:

An artificial assemblage of documents accumulated on the basis of some common characteristic without regard to the provenance of those documents. Not to be confused with an archival fonds. (ICA 2000, 10)

Réunion artificielle de documents en fonction de critères communs liés à leur contenu ou à leur support, sans considération de leur provenance, par opposition au fonds d'archives constitué de façon organique.

(CIA 2000, 11)

(Artefarita grupigo de dokumentoj laŭ kriterioj de komuneco de enhavo aŭ materialo senrilataj al ilia deveno, kontraste al arĥivoj organe formiĝintaj.)

La supraj difinoj evidentigas kiel maltaŭgas la nuna difino de 'arĥivo' en PIV: "kolekto da malnovaj aktoj kaj dokumentoj" (Waringhien 1970/1987). Laŭ arĥivistika teorio, kolektoj estas respondeco de bibliotekoj kaj muzeoj, kaj sekve ne meritas akcepton en arĥivejojn. Povas do surprizi, ke tamen germanlingvaj kaj anglalingvaj arĥivistoj uzas la vorton 'kolekto' en la senco de 'privataj arĥivoj'. Ĉi tiu terminologia konflikto inter teorio kaj praktiko ne estas moderna peko ĵus disvastiĝinta, sed tre antikva problemo kiu jam ĝenis la konservativan Jenkinson (1948, 4): "Arĥivoj ne estas kolekteblaj. Mi dankus se la vorto 'kolekto' estus forpelita el la vortprovizo de la arĥivisto, almenaŭ por fiksi ĉi tiun gravan fakton."⁴ La artefarita lingvaĵo de ISAD(G), kompreneble, estis tute senpova por elradikigi ĉi tiun kutimon, tiel ke la *Encyclopedia of archival science* kompromise proponas distingon inter 'archival collection' kaj 'artificial collection' (Greene 2015). Ĉi tiu malkohereco de la arĥivistika terminaro pliakriĝis lastatempe ĉar publikaj arĥivistoj en ĝermanlingvaj landoj komencis adopti la praktikon kolekti privatajn arĥivojn, kaj memorigas la limojn de terminologio.

La diskutitaj difinoj enhavas fundamentan gravecon por esperantistoj, ĉar de ili dependas, kiuj esperantaj arĥivoj estos akcepteblaj por transdono kaj gardado en publikajn arĥivejojn. Arĥivoj de tutaj organizoj kiel Universala Esperanto-Asocio kaj Esperanto-France kutime ne renkontas hezitojn flanke de profesiaj arĥivistoj kiam esperantistoj proponas transdonon. Necesas tamen atenti, ke ĉiuj publikaj arĥivoj havas tre fortan teritorian specialiĝon, ĉar estas financataj de instancoj kun preciza teritorio kaj celas servi unue la plej proksiman ĉirkaŭantan publikon por helpi al la produktado de loka historio; tial necesas frapi unue la pordojn de arĥivejoj en la regiono kie la organizo jure situis kaj agadis. Se la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno ne estus preta akcepti la arĥivon de UEA, ekzemple, la sekvaj logikaj

4 Bedaŭrinde la aŭtoro kaj la redaktoroj ne sukcesis spuri la anglan originalon de ĉi tiu citaĵo.

kandidatoj estus la nederlanda nacia arĥivejo kaj poste la urba arĥivejo de Roterdamo, plus la regiona aŭ provinca arĥivejo de Sud-Holando se tia ekzistas. Sama kriterio aplikiĝas al arĥivoj de lokaj kaj naciaj esperantaj asocioj.

Ankaŭ personaj dokumentaroj, ekzemple de verkistoj aŭ sciencistoj, estas akcepteblaj se ilia graveco estas bone argumentata, sed esperantistaj famuloj malofte elstaras en aliaj kampoj de la vivo. En tiuj kazoj, ne estas bona ideo apartigi la dokumentojn esperantajn disde la aliaj, ĉar arĥivistoj deziras ricevi la tutan dokumentan produktaĵon de la persono: ilia prioritato estas konservi la materialojn bezonatajn por esplori kaj rekonstrui la tutan biografion de la persono kaj ne nur ties esperantan agadon. Tial estas bona ideo kontakti, krom proksimajn publikajn arĥivejojn, ankaŭ la arĥivistojn de universitatoj kaj esplorcentroj specialiĝintaj en la neesperanta fako en kiu la persono elstaris.

Bedaŭrinde, esperantaj familioj apenaŭ ekzistas kaj, ĉiukaze, tipaj esperantistoj estas grizaj, anonimaj simplaj civitanoj kiuj interesos nek historiistojn nek arĥivistojn. Esperantistoj mem kaj iliaj familianoj vidas en Esperanto ion tute senrilatan al aliaj aferoj de la ĉiutaga vivo. Kiam esperantistoj mortas, la familianoj heredigas al aliaj esperantistoj nur iliajn esperantaĵojn; se la familio forĵetas ĉion en rubejon, la esperantistoj mem, kvazaŭ kadavro-birdoj, elekteme savas nur la esperantaĵojn. Iusence la elektemo estas pravigebla: ne gravas al esperantistoj la simpla individuo mem, kies eksteresperanta vivo similas al ĉiuj aliaj, sed nur la persona kontribuo al esperantismo, kaj inverse ankaŭ la pozitiva efiko, kiu Esperanto havis en la ĉiutaga vivo de normalaj homoj. Dokumentoj de privatuloj pruvas la validecon de la lingvo kaj pravigas ĝian uzon kaj kulturadon; tiusence, necesas memori ke ankaŭ ‘naciaj’ arĥivejoj estis fonditaj ĉefe por propagandaj celoj: videbligi la ekziston de la Nacio kaj ĝian longan historion.

Laŭ pli modernaj arĥivistikaj pensoskoloj ankaŭ dokumentoj de anonimaj esperantistoj meritis konservadon, ĉar instituciaj aktoj ne sufiĉas: asociaj arĥivoj nur spegulas la organizon, publikan kaj financan flankon de esperantismo kaj donas tre nekompletan bildon de Esperanto kiel kultura kaj socia fenomeno kaj ĝia efiko en la ĉiutaga vivo de individuoj. Eblas diri la samon pri ĉiuj tradiciaj arĥivoj. Jam delonge arĥivistoj estas kritikaj al sia ekskluziva atento al institucioj, famuloj, al la potenculoj ĝenerale, kaj demandas al si, ĉu ili plu estu nur la voĉo de siaj mastroj aŭ provu inkluzivi ankaŭ la vivon kaj perspektivon de la normalaj popolanoj; sociaj historiistoj mem pli kaj pli interesiĝas pri la normalaj ĉiutagaj vivkondiĉoj de la popolo, kaj bezonas dokumentojn pri ĝi. Tiu tendenco komenciĝis en momentoj de naciaj krizoj, kiel militoj. Jam en Marto 1944, ekzemple, Anne Frank aŭdis radian anoncon de la nederlanda registaro en londona ekzilo, ke ĝi starigos

arĥivon por dokumenti la suferojn de la nederlanda popolo sub la nazia okupado, kaj tial ŝi komencis prepari sian taglibron por publikigo (Anne Frank Stichting s.j.). Nuntempe disvastiĝas la ideo, ke la vivo de la popolo estas dokumentinda ne nur en eksterordinaraj momentoj, tiel ke publikaj arĥivejoj pli kaj pli malfermiĝas al donacoj de pli variaj dokumentaj heredaĵoj kaj fondiĝas tie kaj tie ‘arĥivoj de la ĉiutaga vivo’.

Kelkaj esperantistoj jam delonge intuciis la bezonon de tiaj arĥivoj, kaj mem fondis ilin. Estas bona ekzemplo la eksa Hispana Esperanto-Muzeo, nuntempe Esperanto Muzeo de Subirats, kies fondinto kolektis korespondaĵojn kaj privatajn kaj asociajn de plej diversaj esperantistoj konataj aŭ anonimaj. Bedaŭrinde, konservativaj arĥivistoj tute neos la arĥivecon de tiaj dokumentaroj, kiujn ili nomas ‘kolektoj’ kvazaŭ insulte kaj rifuzos akcepti. Malgraŭ tiu sinteno, pli vastaj difinoj de ‘deveno’ enŝteliĝas en la arĥivistikan teorion, aparte en anglalingvaj landoj tra la fendeto malfermita de la kontraŭdira esprimo ‘*archival collection*’. Greene mem konfesas ke la organeco de instituciaj arĥivoj tre utilas por tradiciaj historiistoj sed ne tiom gravas por modernaj sociaj historiistoj, kiuj ofte preferus laŭteman ordigon. La diskuto pri privataj kaj familiaj arĥivoj jam montris, ke la nocio ‘deveno’ estas historie elasta. Tamen tiu temo, kiel esperantistoj konvinku arĥivistojn pri la valoro de siaj netradiciaj arĥivoj, meritos propran artikolon. Antaŭe necesas fini ĉi tiun diskutante kiel la popola signifo de ‘arĥivo’, plivastiĝante en unu sencon, tamen ankaŭ malvastiĝis en alia senco, kaj kion esperantistoj lernu de arĥivistoj.

2.7 La malpli vasta senco de ‘arĥivo’

Kvankam en multaj landoj la Franca Revolucio, naciismo kaj la nova burĝa reĝimo etendis la aplikon de la vorto ‘arĥivo’ al privataj arĥivoj, samtempe la riĉeco de ĝia signifo malkreskis kaj perdis karakterizojn. La novaj naciaj arĥivejoj, ofte monumente konstruitaj, staris apartaj kaj senrilataj kun la moderna administracio, kiu daŭrigis sian internan arĥivadon for de la publikaj okuloj. Kiel rekta rezulto de ĉi tiu evoluo, la kultura kaj historia funkcio de arĥivoj tute eklipsis ilian administran funkcion kaj juran valoron en la publika menso, kiel evidentigas la difino de 1935 el la franca Vortaro:

Collection d’anciens titres ou documents concernant le passé d’un peuple, d’une province ou d’un département, d’une ville, d’une famille, d’une institution publique ou privée, etc. (Académie française 1935)

(Kolekto de antikvaj atestoj aŭ dokumentoj koncernantaj la pasintcon de popolo, provinco, departamento, urbo, familio, publika aŭ privata institucio, ktp.)

La nuntempa difino nur modernigis la variecon de la arĥivaj materialoj:

Documents tels que manuscrits, imprimés, photographies, films, enregistrements sonores, etc., concernant [...] (Académie française 1992)

(Dokumentoj tiaj kiaj manuskriptoj, presaĵoj, fotografaĵoj, kinaĵoj, sonregistraĵoj, ktp., koncernantaj [...])

Aliflanke la mencio pri arĥivoj de publikaj aŭ privataj administracioj estas nun forigita. Al nuntempaj franclingvanoj, arĥivoj aperas tute senrilataj kun la normala administrado de ĉiutagaj aferoj, dum fakte la respondeco de arĥivistoj iras de la mezepoka pergameno ĝis la cifereca dokumento ĵus kreita en 'la Nubo'. Por arĥivistoj ĉiu ordigita dokumentaro estas arĥivo, kaj ni distingas maksimume inter 'kuranta' aŭ 'aktiva arĥivo' kaj 'historia' aŭ 'neaktiva arĥivo' laŭ uzateco pli ol antikveco.

Ĉiukaze, kun la disvastiĝo de demokratio, naciismo kaj burĝa liberalismo, la popola malvastigita kompreno de arĥivoj fine penetris la tutan Okcidenton; tiu miskompreno estas la granda malavantaĝo kaj plendo de nia profesio. Kiel bibliotekoj kaj muzeoj, ankaŭ arĥivoj ŝajnas kolektoj de antikvaĵoj, sed ne ĝuas la saman allogon, prestiĝon, kaj financan favoradon. Kiam civitanoj petas akton de publika instanco, entrepreno aŭ privata organizo por pruvi kaj validigi siajn personajn rajtojn, malofte konscias ke trovi ĝin estos tasko por arĥivisto en arĥivo; en ilia menso, nur historiaj arĥivoj estas "arĥivoj". Ankaŭ politikistoj kaj estroj de administracioj havas tian bildon pri arĥivoj kaj eĉ vidas ilin kiel ŝimajn punkarcerojn, al kiuj ili povas malpromocii ĝenajn oficistojn, ankaŭ se ĉi lastaj ne estas diplomitaj arĥivistoj.

Tiun antaŭjuĝon pri arĥivoj heredis ankaŭ la esperantistoj, kiel videblas el vortaraj difinoj. Jam laŭ la vortaro Boirac (1909), arĥivo estis "kolekto de historiaj dokumentoj". Kvankam facilas kritiki la difinon en PIV (Waringhien 1970/1987) (ekzemple: ĉu "malnovaj" signifas unujaraj, dekjaraj, centjaraj?), ĝi almenaŭ konservas la memoron de la administra kaj leĝa funkcio de arĥivoj per la vorto 'akto', dum ĉi tiu nuanco tute mankas en la popola kompreno. Nefakuloj ne konscias la fakton ke tipaj arĥivaĵoj iam servis praktikajn celojn pli ol klerigajn, kaj tiu nescio tute konfuzas la limon inter arĥivoj kaj bibliotekoj. La konfuzo jam rimarkeblis en la difino de la Franca Akademio, kiu inkluzivis "presaĵojn" inter arĥivaĵoj, kaj estas ĝenerala ankaŭ inter esperantistoj. Kiel ekzemplon de popola kompreno de 'arĥivo' mi citos raporton de La Konkordo, senditan al Flandra Esperanto-Ligo la 13an de Februaro 1995 por diskuti la estontecon de la Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet:

Ĉu la fondaĵo servu kiel superrigardo de la esperantomovado, precipe utila el historiista vidpunkto, aŭ ĉu ĝi plie estu spegulo de la nuna situacio de Esperanto, pruvido ke la lingvo vivas? Alie vortumita, ĉu la fondaĵo restu speco de arkivo de la esperantomovado aŭ ĉu preferindas plukonstrui ĝin ĝis speco de esperanta publika biblioteko, komparebla kun nacilingvaj bibliotekoj?⁵

Kvankam la raporto poste komparis la karakterizojn de arĥivo kun tiuj de biblioteko, evidentis ke por la kortrejkanoj ili estis nur la nepruntebleco, plus la prioritato kompletigi jarkolektojn de revuoj anstataŭ akiri novajn librojn kaj revunumerojn. La unikeco de arĥivoj evitas ankaŭ esperantologojn, kiuj interesiĝas pro ilia historia valoro sed same ne vidas rilaton kun efika administrado. Jen kiel Detlev Blanke (2007, 12) difinas Esperanto-arĥivon kompare al Esperanto-biblioteko: “kolektaĵo, kiu konsistas ĉefe el ne-libro-formaj dokumentoj rilatantaj al la historio de la loka, regiona aŭ internacia esperanto-komunumo kaj ĝiaj personoj”. Lia difino kaj kontrasto kun bibliotekoj estas ĉefe negativa: arĥivoj ne enhavus librojn. Kiel la Franca Akademio, li prave rimarkigas ke arĥivaĵoj ne nepre devas esti paperaj kaj aldonas longan liston de eblecoj, de “printaĵoj el la reto” ĝis “kalendaroj, fotoj, sonbendoj, vidbendoj, kompaktdiskoj kaj insignoj”, sed pluraj el ili, kiel sonbendoj kaj kompaktdiskoj, estus troveblaj ankaŭ en bibliotekoj, do li ankoraŭ ne trafis la kernan trajton de arĥivoj. Pli grava estas la rimarkigo, ke “malsame al libroj, granda parto de arkivaĵoj estas unikaĵoj”, sed plej elstare mankas ia mencio de la origino de la arĥivaĵoj, kaj de la praktika celo kiun ili servas; videblas ĉi tie neniuj konektoj inter la materialoj kaj la agadoj de organizo aŭ persono.

Resume, la popola imago vidas neniun organan rilaton inter arĥivoj kaj la normala ĉiutaga plenumado de aferoj en organizo aŭ hejmo. Tiu nekonscio havas negativajn sekvojn. Unue, organizoj malhavigas al si la profesion kompetenton de arĥivistoj en la ordigado, mastrumado kaj konservado de dokumentoj, tiel utilan kaj tempoŝparan en ĉia efika administrado. Due, oni lasas al la hazardo la elektadon kaj konservadon de la arĥivoj de nia epoko por la estonteco. Ĉi tiu lasta sekvo estas aparte zorgiga nun, kiam ni postlasis la tempon de paperaj dokumentoj kaj jam interniĝis preskaŭ 30 jarojn en la bitan eraon. Nuntempe arĥivistoj estas pli bezonataj ol iam ajn, ĉar bitaĵoj estas multe pli efemeraj ol paperoj. Eblas forgesi paperajn dokumentojn en tirkesto kaj tamen esperi, se la klimataj kondiĉoj ne estis ekstremaj, ke post jardekoj ili ankoraŭ estos legeblaj. Tion arĥivistoj nomis ‘benigna neglekto’. Kontraŭe, elektronikaj diskoj komencas erari post kvin jaroj, aŭ pli frue

5 Ankaŭ ĉi tiu raporto troviĝis skanita en la retejo de la Fondaĵo Cesar Vanbiervliet kaj ŝajnas ne plu trovebla sur la retpaĝo Esperanto-Kortrijk (2021b).

se ne regule ŝaltataj kaj konektataj al elektro. Malnovaj sonbendoj kaj vidbendoj, kvankam bone konservitaj, ne plu estos ludeblaj kiam paneos la lasta uzebla ludilo. Dokumentoj en ‘la Nubo’ facile perdiĝas se la servilon atakas krimuloj, aŭ se oni forgesas pasvorton aŭ pagi la fakturon. Kion ni lasos al niaj posteuloj? Ĉu ni eniris novan Malluman Mezepokon?

Ĝuste por korekti la eraran limigitan komprenon de arĥivoj la Universala Deklaracio pri Arĥivoj (ICA 2011) admonas ke “la dokumentoj estas mastrumataj ekde sia kreo por konservi ilian valoron kaj sencon”, kaj ke sekve necesas plani longperspektivan konservadon jam de la komenco, por kio la kompetentoj de arĥivistoj estas plene valoraj. Ĝi ankaŭ memorigas “la diversecon de materialoj sur kiuj arĥivaĵoj estas kreataj kaj konservataj: paperaj, ciferecaj, aŭdvidaj, aŭ ĉiaspecaj”, por ke ni ne forgesu, ke la nuntempaj bitaĵoj estos nia heredaĵo por la venontaj generacioj. Laste, ĝi admonas ke “la mastrumado de arĥivoj estu valora kaj plene efektivigata en ĉiu publika aŭ privata organizo kiu kreas kaj utiligas arĥivaĵojn dum siaj agadoj”.

Krom adoptigi kaj aplikigi la UDA’n en la ĉiutaga laboro de siaj organizoj, kion esperantistoj povas fari por plibonigi la publikan bildon de arĥivoj inter si antaŭ ol estos tro malfrue? Plia ebleco povas esti ŝanĝi la vortarajn difinojn por pliproksimigi la ĝeneralan lingvon al la speciala lingvo de arĥivistoj; precedencoj de tia lingvoplana interveno ne mankas. Ĝis 1989 la difino de ‘*archivo*’ en la Vortaro de la Hispana Reĝa Akademio estis simple “ejo kie estas gardataj publikaj aŭ privataj dokumentoj”, sed en 1992 estis ŝanĝita al “organa aro da dokumentoj kiun homo, societo, institucio, ktp produktas per la ekzercado de siaj funkcioj aŭ agadoj”. Ankaŭ en la lasta eldono de la kataluna vortaro Fabra (1986), ‘*arxiu*’ estis “kolekto de publikaj aŭ privataj dokumentoj; ejo kie ili estas gardataj”,⁶ sed kiam en 1995 la Vortaro de la Instituto pri Katalunaj Studoj anstataŭis ĝin kiel norman vortaron, la difino fariĝis “aro da dokumentoj amasigitaj de homo aŭ institucio kiel rezulto de agado propra aŭ aliula”. Tiuj povus esti modeloj por PIV.

Povas ŝajni ke esperantistoj, kiuj estis avangardo de terminologio kun Wüster, nun postrestas, sed ne plu temas pri terminoj ĉar ni celas intervenon en ĝenerallingvaj vortaroj. Ĉar tia interveno estos intenca, ĝi ne rekte respondos al la koncepto ‘malterminigo’ difinita de Werner kiel spontana. Tamen, ĝi tute konformos al lia priskribo de malterminigo kiel “rezulto de la altiĝanta ĝenerala klereco de la homaro” kiu okazas “kiam homoj havas konsiderinde pli da libera tempo por siaj kromprofesiaj interesoj”, ĉar pliprecizigos la ĝeneralan lingvon. Ĝi ne plu estos secesio de elito, sed ties

6 “col·lecció de documents públics o particulars; local en què són estotjats.”

reunuigo kun sia popolo. Tiu kleriga, malelitiga efiko de Esperanto plene harmonios kun la funkcio de nia lingvo kiel ‘nobla hobia’, kiel ĝin difinis Kálmán Kalocsay.

Bibliografio

- Académie française. 1718. *Nouveau Dictionnaire de l'Académie française, Dedié au Roy*, vol. 1. Paris: Jean-Baptiste Coignard. <https://www.dictionnaire-academie.fr/article/A2A1007>
- Académie française kaj Institut de France. 1835. *Dictionnaire de l'Académie française*. 6-a eld. Paris: Firmin Didot frères. <https://www.dictionnaire-academie.fr/article/A6A1665>
- Académie française. 1935. *Dictionnaire de l'Académie française*. 8-a eld. Paris: Hachette. <https://www.dictionnaire-academie.fr/article/A8A1807>
- Académie française. 1992. *Dictionnaire de l'Académie française*. 9-a rev. eld. Paris: Imprimerie nationale. <https://www.dictionnaire-academie.fr/article/A9A2440>
- Anne Frank Stichting. s.j. “Gerrit Bolkestein.” <https://research.annefrank.org/en/personen/eab8c158-7480-49f2-833a-c574268b06c3/>
- Banat-Bergère, Françoise kaj Christine Nougaret. 2015. “Archival Fonds.” En *Encyclopedia of Archival Science*, redaktis Luciana Duranti kaj Patricia C. Franks, 50–52. Lanham: Rowman & Littlefield Publishers.
- Blanke, Detlev. 2007. “Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj: kelkaj problemoj.” En *Lingvo kaj interreto kaj aliaj studoj* (Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), redaktis Zdeněk Pluhař, 75–81. Dobřichovice: Kava-Pech.
- Boirac, Émile. 1909. *Plena vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-franca*. Chabot-Charny: Presejo Darantière.
- Cart, Théophile. 1909. *Unua oficiala aldono al Universala Vortaro*. Paris: Esperantista Centra Oficejo. <https://data.onb.ac.at/rep/10B8310D>
- [CIA] Conseil International des Archives. 2000. *ISAD(G): Norme générale et internationale de description archivistique; adoptée par le Comité sur les normes de description Stockholm, Suède, 19–22 septembre 1999*. 2-a eld. Ottawa. https://www.ica.org/app/uploads/2024/01/CBPS_2000_Guidelines_ISADG_Second-edition_FR.pdf
- [CIA] Conseil International des Archives. s.j. The Universal Declaration on Archives – <https://www.ica.org/resource/universal-declaration-on-archives-uda/> (08.04.2026)
- Duchain, Michel. 1985. “Les archives dans la Tour de Babel: problèmes de terminologie archivistique internationale.” *Gazette des archives* 129, kajero 1: 103–113. <https://doi.org/10.3406/gazar.1985.2934>
- Esperanto-Kortrijk. 2021a. Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet. <https://sites.google.com/site/esperantokortrijk> (08.04.2026)

- Esperanto-Kortrijk. 2021b. Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet. <https://sites.google.com/site/esperantokortrijk/Jarraportoj/administraj-dokumentoj> (19.05.2026)
- Evans, Frank B. 1984. *Dictionary of Archival Terminology / Dictionnaire de Terminologie Archivistique* (ICA Handbooks Series 3). München k.a.: Saur.
- Fabra, Pompeu. 1986. *Diccionari general de la llengua catalana*. 22-a eld. Barcelona: EDHASA.
- Fernández Asensio, Rubèn. 2025. "La Universala Deklaracio pri Arĥivoj; aŭ, metu arĥiviston en vian vivon!" En *Internacia Kongresa Universitato: 77-a sesio / Scienca Universitata Sesio: 41-a sesio*, redaktis Anna Striganova, Dmitriĵ Ŝevĉenko kaj Amri Wandel, 213–228. [Moskvo]: Eldonejo "Impeto".
- Gilliland, Anne J., Sue McKemmish kaj Andrew J. Lau. 2016. "Preface." En *Research in the Archival Multiverse*, 27–29. Clayton, Victoria: Monash University Publishing. https://doi.org/10.26530/oapen_628143
- Gilliland, Anne J. kaj Tamara Štefanac. 2018. "Independent Community Archives: Challenging the Status Quo of Private and Public Archives." *Atlanti* 28, kajero 1: 207–215.
- Greene, Mark. 2015. "Archival Collection." En *Encyclopedia of Archival Science*, redaktis Luciana Duranti kaj Patricia C. Franks, 32–35. Lanham: Rowman & Littlefield Publishers.
- [ICA] International Council on Archives. 2000. *ISAD(G): General International Standard Archival Description: Adopted by the Committee on Descriptive Standards, Stockholm, Sweden, 19–22 September 1999*, 2-a eld. Ottawa. https://www.ica.org/app/uploads/2024/01/CBPS_2000_Guidelines_ISADG_Second-edition_EN.pdf
- [ICA] International Council on Archives. 2011. Universala Deklaracio pri Arkivoj. <https://www.ica.org/app/uploads/2025/08/Esperanto-%E2%80%9393-Universal-Declaration-on-Archives-UDA.pdf> (19.05.2026)
- InterPARES Trust. 2024. Terminology Database. <https://interparestrustai.org/terminology> (08.04.2026)
- Jenkinson, Hilary. 1937. *A Manual of Archival Administration*. London: Percy Lund, Humphreys & Co.
- Jenkinson, Hilary. 1948. *The English Archivist: A New Profession: Being an Inaugural Lecture for a New Course in Archive Administration Delivered at University College, London, 14 October, 1947*. London: H. K. Lewis.
- Maradan, Mélanie. 2011. "Terminologiaj registraĵoj." En *Modernaj teknologioj por Esperanto* (Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, KAEST 2010), redaktis Katarína Nosková kaj Peter Baláž, 105–114. Viŝazná/Partizánske: Espero. <https://permalink.obvsg.at/AC11524199>

- Muller, Samuel, Johan Adriaan Feith kaj Robert Fruin. 1920. *Handleiding voor het ordenen en beschrijven van archieven. Ontworpen in opdracht van de Vereniging van Archivarissen in Nederland*. 2-a eld. Groningen: Erven B. van der Kamp.
- Pokrovskij, Sergej B. 1995. *Komputika leksikono*. Jekaterinburg: Sezonoj. <https://permalink.obvsg.at/AC01255979>
- Roberto, Claude, Karen Anderson kaj Margaret Crockett. 2021. "Translating the Universal Declaration on Archives: Working with Archival Traditions and Languages across the World." *Archives and Manuscripts* 49, kajeroj 1–2: 37–61. <https://doi.org/10.1080/01576895.2020.1854095>
- Saussure, Ferdinand de. 1916. *Cours de linguistique générale*, redaktis Charles Bally kaj Albert Sechehaye – traduko. 2022. *Kurso de ĝenerala lingvistiko*, tradukis Fernando Pita. 1-a eld. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.
- Schellenberg, Theodore R. 1956. *Modern Archives: Principles and Techniques*. Chicago: University of Chicago Press.
- Simpson, John A. kaj Edmund S. C. Weiner, red. 1989. *The Oxford English Dictionary*. 2-a eld korektita. Oxford: Clarendon.
- Suonuuti, Heidi. 1998. *Terminologia gvidilo* (Nordterm 8), tradukis Sabine Fiedler. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Termcat Centre de terminologia. 2026. Quaranta anys acompanyant canvis socials a través dels termes 1985–2025. <https://www.termcat.cat> (08.04.2026)
- Walne, Peter kaj International Council on Archives. 1988. *Dictionary of Archival Terminology: English and French with Equivalents in Dutch, German, Italian, Russian and Spanish / Dictionnaire de Terminologie Archivistique* (ICA Handbooks Series 7), redaktis Peter Walne. 2-a rev. eld. München k.a.: Saur.
- Waringhien, Gaston, ĉefred. 1970. *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Represo de la 3-a eld. kun suplemento 1987. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Werner, Jan. 2004. *Terminologiaj konsideroj*. Dobřichovice: Kava-Pech. <https://libro.ee/file.php?id=1409>
- Wüster, Eugen. 1979. *Einführung in die Allgemeine Terminologielehre und Terminologische Lexikographie*, redaktis Leopold Bauer. Wien: Springer in Komm.
- Zamenhof, L. L. 1905. *Fundamento de Esperanto*, redaktis André Albault, 10-a eld. 1991. Pisa: Edistudio.

Pri la aŭtoro

Rubèn Fernández Asensio ricevis diplomon pri kataluna filologio de la Universitato de Barcelono kaj esperantistiĝis en 1998. Poste loĝis en Koreio, Japanio kaj Havajo, en kies universitato magistriĝis pri aplikita lingvistiko kaj hispana filologio, per referaĵoj publikigitaj en akademiaj ĵurnaloj. Instruas Esperanton ekde la jaro 2018 en UNED (hispana distanca universitato). En 2024 fariĝis magistro pri arĥivistiko per referaĵo pri *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale* (CDELI), farinte ankaŭ praktikon en la Eŭropa Centra Banko.

Retadreso: enseikou@yahoo.com

About the author

Rubèn Fernández Asensio majored in Catalan Philology from the University of Barcelona and became an Esperantist in 1998. He later lived in Korea, Japan, and Hawaii, where he earned a master's degree in Applied Linguistics and Spanish Philology, with papers published in academic journals. He has been teaching Esperanto since 2018 at UNED (Spanish distance university). In 2024, he obtained a master's degree in Archival Science through a thesis on *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale* (CDELI), after completing an internship at the European Central Bank.

Sobre l'autor

Rubèn Fernández Asensio es va llicenciar en filologia catalana a la Universitat de Barcelona i va aprendre esperanto el 1998. Després, va viure a Corea, Japó i Hawaii, on va obtenir un màster en lingüística aplicada i filologia espanyola, amb tesis publicades en revistes acadèmiques. Ha ensenyat esperanto des del 2018 a la UNED (universitat a distància espanyola). El 2024, va obtenir un màster en arxivística amb una tesi sobre *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale* (CDELI), després de fer pràctiques al Banc Central Europeu.

Against terminology: the 'archival Esperanto' that never was

Abstract: To help Esperanto speakers understand archival terms, theory, and practice, and thus aiding them in gaining acceptance for their archives, this article reviews the terminology proposed by the International Standard Archival Description (ISAD(G)) against the diversity of common language concepts in English, French, Spanish, German, and Catalan, paying particular attention to the history and development of the word and concept of 'archive' in various languages;

the application of archival terms to computers is also discussed. The comparison concludes that although archival science as a discipline has not adequately resolved the differences between various archival traditions nor the diversity of conceptual systems, the problem may lie in theoretical terminology itself and in the notion of ‘international harmonization’, which is no longer practicable due to the hegemony of the English language; however, replacing English with Esperanto would not solve the problem of international terminology either. Since archival terms promote international communication but also hamper outreach to the general public, instead of developing a separate archival terminology in Esperanto, ‘determinologization’ through intervention in common language dictionaries is proposed; advice is also suggested for transferring Esperanto archives to public archivists.

Keywords: Archival science; Terminology; Comparative semantics; Etymology; International harmonization

Contra la terminologia: l’“esperanto arxivístic” que mai no s’esdevingué

Resum: Per ajudar els esperantistes a comprendre els termes, la teoria i la pràctica arxivística, i així guanyar acceptació per als arxius en esperanto, aquest article revisa la terminologia proposada per la Norma Internacional General de Descripció Arxivística (ISAD(G)) enfront de la diversitat de conceptes en la parla corrent de l’anglès, el francès, l’espanyol, l’alemany i el català, amb una atenció especial a la història i l’evolució de la paraula i concepte ‘arxiu’ en diverses llengües; també s’examina l’aplicació dels termes arxivístics a la informàtica. La comparació conclou que, tot i que l’arxivística com a especialitat no ha resolt adequadament les diferències entre tradicions arxivístiques o entre sistemes de nocions incomparables, el problema pot residir en la teoria terminològica mateixa i en la noció d’“harmonització internacional”, que ja no és viable a causa de l’hegemonia de la llengua anglesa; no obstant això, substituir l’anglès per l’esperanto no resoldria tampoc el problema de la terminologia internacional. Atès que els termes arxivístics ajuden a la comunicació internacional però també dificulten la comunicació amb el públic no especialitzat, en comptes de desenvolupar una terminologia arxivística separada en esperanto, es proposa una “determinologització” mitjançant la intervenció als diccionaris de llengua general; també es proposen consells per a la transferència d’arxius esperantistes a arxius públics.

Paraules clau: Arxivística; Terminologia; Semàntica comparativa; Etimologia; Harmonització internacional